


Turanga
32
u k o



4^a trimestro 2013

En tiu numero
vi legos..



Rakonto pri ĉina ideografiaĵo



esperanto
CENTRE CULTUREL
CONFERENCE
16 h
Dimanche
salle 120

★★★★★
★ P1 ĝis 7 ★
★★★★★

La culture du thé en Chine
Par Mme Zhang Ping
Journaliste à Radio Chine
Internationale

Les Fâcheux
Baroka teatro

★★★★★
★ P 7 kaj 8 ★
★★★★★

Meze de Aŭgusto la grupo ricevis proponon por akcepti Ĉinan esperantistinon okaze de sia turneo en Francio de la 16a de Novembro ĝis la 8a de Decembro. En nia respondo ni aldonis, ke estus bone, ke ŝi venu en Tours dum la Festivalo de Lingvoj. Ni jam anoncis titolon de prelego rilate al esperanto. Do ni modifiis la titolon de la prelego ĉar ni deziris, ke ĝi estu farata de nia vizitantino.

Inter la tri temoj proponitaj de ŝi, ni elektis "Ĉinan Tekulturon". Jean-Louis Le Brizault akceptis ŝin en la stacidomo de Tours, sabaton la 23an, je la 17a kaj duono. Post instalado en la domo de J-L. kaj Denise, ŝi venis al la Festivalo. Vespere ŝi partoprenis kune kun kelkaj membroj de la grupo al la vespermanĝo organizita de Linguafest'37.

Dimanĉon matene ŝiaj gastigantoj vizitigis al ŝi la urbon kaj posttagmeze ŝi denove povis promeni kaj foti antaŭ la diversaj budoj de la Festivalo kaj partopreni en kursoj.

Ĉirkaŭ kvardek personoj partoprenis en la prelego, inter ili kelkaj esperantistoj. Feliĉe ŝi sendis al mi la enhavon de la prelego rete du semajnon antaŭe, tiel la interpretado estis pli facila.

Ĉar ŝi disponis nur unu horon, ŝi ne prezentis la tuton de la prelego, tial kelkaj membroj de la klubo petis, ke mi publikigu la kompletan tekston de la prelego.


Mi aldonas fotojn faritajn dum la Festivalo.

Jacques Gaumé

Saluton! Karaj samideanoj. Mia nomo estas Zhang Ping. Zhang estas mia familia nomo kaj Ping la persona nomo, signifanta pacon kaj kvietecon. Mia esperanta nomo estas Ĝoja.


Mi ege ĝojas havi la ŝancon renkontiĝi kun vi kaj prezenti la ĉinan tekulturon. Ĉinoj ŝatas trinki teon, kaj ofte unu taso da tetrinkaĵo komencas la novan tagon. Teo originis de Ĉinio kaj disvastiĝis al la aliaj mondpartoj. La historio de eltrovo kaj utiligo de tefolioj jam superis 5 mil jarojn. En la jaro 1636, teo estis unuafoje transportita en Parizon, pli frue ol Britio je 22 jaroj. Frue en la 19a jarcento francaj restoracioj kaj hoteloj ek liveris tetrikaĵojn. Kaj nun en Francio troviĝas multaj tetrinkejoj.

Ĉu iuj amikoj antaŭe vidis la tearbon, plukis freŝajn tefoliojn aŭ persone ellaboris tefoliojn?



La tekultivejo troviĝas en la ĉina sudo-

rienta urbo Hangzhou, Zhejiang-provinco (punkto sur la mapo sube). Tie estas la pro-



duktejo de la verda teo Longjing-teo. Tearboj kreskas en la zono de sud-latitudo je 45 gradoj ĝis nord-latitudo je 38 gradoj, kie la sunumado estas sufiĉa kaj pluvado ofta. Estas tre favora la acida kaj fekunda grundo riĉa je abundaj organikaj substancoj kaj bona je konservado de akvo. Kaj la taŭga temperaturo estas inter 18 gradoj ĝis 28 gradoj celsiusaj.



Matene la suno leviĝas sur la tekultivejo. Kultivistoj komencis pluki freŝajn tefoliojn. Ofte virinoj plukas tefoliojn kaj viroj ellaboras teon.



Tiam mi maĉis freŝajn tefoliojn, kiuj estas ege amaraj, sed mi ŝatas la guston, precipe en la varma tagmezo la amaraj freŝaj tefolioj sensojfikas min. Freŝaj tefolioj de la verda teo Longjing-teo estas plukeblaj nur en printempo, ĝenerale en la antaŭaj du tagdekoj de aprilo. Sed iuj aliaspecaj tefolioj povas esti plukataj en diversaj sezonoj, ekzemple Pu'er-tefolioj povas esti plukataj de marto ĝis novembro. Escepte de vintro ĉiuj sezonoj estas taŭgaj por prilabori tian teon.

Post plukado, tekultivistoj devas komen-ci prilaboron. Longjing-teo apartenas al verda teo, senfermenta. Ĝi entenas aminoacidon, multajn vitaminojn kaj aliajn elementojn utilajn al la homa sano. Kontinua trinkado de verda teo povas preventi kanceron kaj miokardian malsanon, samtempe redukti korpulentecon.

Prononco de teo

La historio de eltrovo kaj utiligo de tefolioj jam superis 5 mil jarojn. Nun teon produktas 61 landoj aziaj, eŭropaj, afrikaj, amerikaj kaj oceaniaj kaj trinkas du trionoj de la monda loĝantaro el pli ol 100 landoj. Do, kiel ili prononcas la vorton "teo"? Nun ni vidu skribon de teo en kelkaj lingvoj.

Germana	Tee	Rusa	чай
Hispana	Té	Portugala	chá
Franca	thé	Kroata	Čaj
Itala	tè	Serba	Čaj
Esperanto	teo	Vjetnama	trà
Malaja	teh	Rumana	ceai
Angla	tea	Bangladeŝa	ট
		Tamil	தே

Ĉu vi trovis la regulojn?

Similas kaj la prononco kaj la skribo. Ĉefe estas du speco "Cha" kaj "te".

Ĉar la ĉina teritorio estas vastega, tial en diferencaj lokoj la prononco de teo ne estas tute sama. "Cha" kaj "te" estas la du ĉefaj, ankaŭ plej popularaj en la mondo.

"Cha" estas en la nuna norma ĉina lingvo, kiu baziĝas sur la pekina dialekto, kaj tiu vorto estis transplantita en la lingvoj de Japanio, Serbio, Kroatio, Rumanio kaj Portugalio; kaj "te" devenis el la dialekto en la suda provinco Fujian, kiu eniris en la vortoprovizon de multaj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Rakonto pri Shennong

El kiu la prononco de teo devenis? Ĝi fontis el la rakonto de Shennong.



Kiu estas Shennong? Ĉinoj estas titolitaj posteuloj de Yandi kaj Huangdi, Shennong ĝuste estas Yandi, prapatro de ĉinoj. Li vivis en la neolitiko, preskaŭ antaŭ 5 mil jaroj.

Shennong inventis kultivadon kaj medicinon. Laŭlegende, Shennong gustumis multajn herbojn por serĉi drogojn por la popoloj. Kiam li gustumis teon, li trovis, ke ĝi bonodoras kaj havas efikojn de sensoifigo kaj mildigo de internaj varmo kaj febro. Tial li rigardas ĝin kiel drogon.

Laŭ alia rakonto, la ventro de Shennong estas travidebla, sekve, kiam li gustumis manĝaĵojn, li povis vidi la peristaltajn movojn de la manĝaĵoj en la intestoj kaj stomako. Manĝinte tefoliojn, Shennong vidis, ke la tefolioj frotpurigis la intestojn kaj stomakon, forigante la toksinon.

(mi pligandigis la literojn, de la sekvantaj paragrafoj, por ke la detaloj de la ideografiaĵoj estu pli bone videblaj) J.G.

Pro tio Shennong titolis la planton "ĉine 擦" kun la signo de frotpurigo, la prononco de "ĉine 擦" estas la fonto de la nuna ideografiaĵo teo "ĉine 茶".

La plej frua skribo de teo ne estas la nuna, sed tiu ĉi "茶", ĝi unuafoje aperis en la ĉina unua poemaro titolita "La libro de poezio" (ĉine 诗经), verkita antaŭ pli ol 3 mil jaroj, ankaŭ tiam ĉinoj komencis kultivi tearbojn. La prononco de la ideografiaĵo "茶" estas tu aŭ cha (nuna prononco de teo en la ĉina lingvo), ĝi havas tri signifojn, unu estas teo kaj la aliaj respektive nomo de iu amara legomo kaj nomo de iu blanka floro.

En la antikva Ĉinio, teo havas multajn titolojn, ekzemple la menciita "茶" (tu), "茶" (cha), "茗" (ming), "薷" (chuan) kaj "檟" (jia). Estas Lu Yu (733–804), kiu unuigis diversajn titolojn de la planto je "茶", nome "teo". De tiam ĉinoj uzas nur la ideografiaĵo "茶" por esprimi la sencon de "teo".

La ĉina ideografiaĵo "茶" konsistas el tri partoj kun la signifo respektive: la supra parto estas la kapo de la ĉina ideografiaĵo "草", signifanta herbon. la suba ligno "木" kaj la meza la homo "人". La kapo de la ĉina ideografiaĵo herbo "草" kaj la ligno "木" aludas, ke tearbo apartenas al

vegetalo, kaj la homo "人", staranta inter la herbo kaj la ligno, signifas, ke la homo harmonie vivas kun la vegetalo, nome la naturo. Laŭ Lu Yu kaj aliaj ĉinaj antikvaj erudiciuloj, teo simbolas la karakteron de nobleco, nome "精行俭德" modesteco, modereco, simpleco, humileco kaj persisteco.

"茶" ankaŭ havas la aludon de longvivo. Ĉar la ĉina ideografiaĵo "茶" povas esti dividita en 4 partoj: "甘" (nian), "八", "十" kaj "八", kiuj simbolas respektive dudek, ok, dek kaj ok, kaj la subaj partoj "十" kaj "八" kune formis okdek, tial la totala kvanto de la 4 partoj estas 108. Tial ĉinoj titolas 108-jaraĝon teaĝo, Mi esperas, ke vi, karaj amikoj, nun komencu trinkadon de teo kaj ĉiuj vivu tra la teaĝo.

Do, ni jam konas la devenon de la prononco kaj skribo de teo, nun estas la tempo por gustumi teon.

Ĉina teetiketo

Mi volas infuzi en la ĉina teetiketo teon. La ĉefa tetrinkilo, uzota, estas la tetaso kun kovrilo.



La tetaso kun kovrilo konsistas el tri partoj: la taso, la subtaso kaj la kovrilo. Unue aperis tetaso, poste en la dinastio Tang (618p. K.—907 p. K.) preskaŭ antaŭ pli ol mil jaroj, filino de iu registara oficisto fiksas lignan pladon sub la tason por eviti bruldifekton, tial inventis la subtason. Fine de la dinastio Ming (1368-

1644) preskaŭ antaŭ 400 jaroj ekfuroris uzado de la kovrilo. La kovrilo, la taso kaj la subtaso simbolas respektive la ĉielon, la homaron kaj la teron. Ĉi tia tetasa kompleto simbolas harmonian kunekzistadon de la homaro kaj la naturo. (ĉine 天人合一). Tio fontis el la ĉina antikva filozofio, nome la kono de antikvaj ĉinoj al la mondo. Ili opiniis, ke origine la mondo estis la ĥaoso. Poste malpeza aero leviĝis kaj formis la ĉielon kaj la peza malleviĝis kaj formis la teron. Inter ili naskiĝis kreskaĵoj, inkluzive de la homaro. Tial de la naskiĝo la homaro estas la parto de la naturo. La tetaso kun la kovrilo ĝuste montras la simplan konon de ĉinoj pri la naskiĝo de la mondo.

Do, kiamaniere oni trinku teon per la tetaso? Akceptinte la tetason kun kovrilo, unue movu la kovrilon antaŭ sia nazo por flari aromon de la teo, poste levu la subtaso, per la kovrilo dispuŝu la tefoliojn flosantajn sur la tetrinkaĵo, kaj fine trinku la teon.

Do, kiam vi akceptos la tetrinkaĵon, tiam por esprimi dankon kaj respekton vi bezonos fleksi la fingrojn dekstrajn aŭ maldekstrajn, frapi la tablon per unu, du aŭ tri fingraj artikoj. Tio fontis el iu legendo:

Antaŭ pli ol 200 jaroj tiama ĉina imperiestro Gaozong kun la regad-titolo Qianlong estis tetrinkemulo. Por koni la vivon de popolanoj, akompanata de eŭnuko la imperiestro Qianlong vizitis tetrinkejon. En la tetrinkejo servisto elverŝis boligitan akvon el longverŝila tekruĉo en la tetason de Qianlong. Li lerte uzis la tekruĉon kaj ne elverŝis la akvon ekster la teta-




so. Tio vekis intereson de la imperiestro. imitante la serviston, imperiestro Qianlong provis verŝi akvon en la tason de la eŭnuko. Tio timigis la eŭnukon, ĉar la imperiestro persone infuzis teon por li. Laŭ regulo li devas surgenue klini la kapon ĝis la tero al la imperiestro. Sed ĉi tie estas tetrinkejo, ne la palaco, kaj la statuso de la imperiestro devas esti sekreta. Kion fari? La saĝa eŭnuko tuj fleksis siajn fingrojn, antaŭ la imperiestro, frapis la tablon per la artikoj de siaj dekstraj fingroj montra kaj meza. En la ĉina lingvo, la prononco de ĉina ideografiaĵo "mano" (手) estas sama kun la pronoco de la ideografiaĵo "kapo" (首), pro tio la eŭnuko kaj observis la regulon kaj tenis la imperiestran statuson sekreta. Sekve ekcirkulis tiu ĉi moro, kaj ĉinoj ofte esprimas respekton kaj dankon per la maniero, ke se vi akceptas tetrinkaĵon prezentitan de plijunaj personoj, frapu la tablon per unu fingro. Se vi akceptas tetrinkaĵon el samaĝulo aŭ pliaĝulo, frapu la tablon per du aŭ tri fingroj.

Cetere, dum mia infuzado de teo, bonvole aprecu filmeton, faritan de ĉinaj studentoj el la tekultura fako de la ĉina Zhejianga Agrikultura kaj Forstokultura Universitato. La ideo de la filmeto fontas en la



aŭtobiografia prozo, titolita "Ses Notlibroj pri Vagado (ĉine 浮生六记)" (france: Six secrets au fil inconstant des jours; Bruxelles & Éacute;ditions F. Larcier, Traduit du chinois par P. Ryckmans. 1966)



La verkisto noma-
ta Shen Fu (ĉine
沈复) estis ankaŭ
pentristo de la ĉi-
na dinastio Qing
(1644-1911). Li
verkis la prozon
en la jaro 1808. Li
kaj lia edzino
Chen Yun (ĉine
陈云) havis sa-
man idealojn kaj
celon. Kaj estis la

profunda amo inter ili. La aŭtobiografia
prozo ĝuste rakontas pri ilia ĉiutaga vivo.

*"Somere ekridis lotusfloroj, kies peta-
loj sin fermis nokte kaj malfermis mate-
ne. Vespere mia edzino Yun metis iom da
tefolioj en la gazan saketon kaj lokis ĝin
en la lotusfloran centron. Matene de la
sekva tago ŝi prenis la saketon el la lotuso
kaj per fontakvo infuzis la tefoliojn. La
tetrinkaĵo aromas freŝe kaj mirinde, kaj
la gusto estas bonega."*

Nun bonvole aprecu la plezuran vivon de la
geedzoj kaj la ĉina teetiketon...

The screenshot shows a web browser window with the URL `esperanto.cri.cn/other/tea/tea.htm`. The page header includes the 'CRI online' logo and a language selection dropdown set to 'Esperanto'. Below the header is a navigation bar with links like 'Ĉefpaĝo', 'Novaĵoj kaj Komentoj', and 'Fenestro de Ĉinio'. The main content area is divided into two images: a man in a vest drinking from a white cup, and two young girls in traditional Chinese clothing preparing tea. Below these images is a green banner with the text 'ponto de amikeco Teo' and a row of small thumbnail images. On the right side, there is a calendar for April with dates 15, 16, 17, 18, 19, and 20 highlighted. Below the calendar is a social media widget for Weibo, showing a profile for 'China_茶2013' with a '加关注' (Follow) button. At the bottom, there is a small text block with a quote: '做自己想做的//@王菲古琴: 我常常被很多人这么问过, 还有许多外国人问不懂中文的歌词? 帮助回答: 1. 喜欢歌词本身, 入迷歌词意境, 欣赏'.

Por kompleti tiun raporton, vi povas uzi la subajn adresojn, kiuj permesas spekti fotojn kaj filmetojn :

☉<http://esperanto.cri.cn/other/tea/tea.htm>

Ĉefa paĝo

☉<http://esperanto.cri.cn/1421/2013/04/12/1s148588.htm>
"Vidindaĵoj de teplantejo en Longwu"

☉<http://esperanto.cri.cn/1421/2013/04/12/1s148585.htm>

"Tekultivista Vivo en Hangzhou"

☉<http://esperanto.cri.cn/1421/2013/04/12/1s148583.htm>

"Teceremonio"

Jacques Gaumé



LA BAROKA TEATRO

Antaŭ kelkaj jaroj, mi tuthazarde spektis teatraĵon, kiu mirigis min. Tio okazis en kelo ĉe la kastelo « la Chatonnière » kaj la temo de la spektaklo estis fablojn de La Fontaine. Ĝis tiam, nenio eksterordinara, sed post la tri frapoj magio tuj efikis : ne elektraĵoj lampoj, nur kandeloj por lumigi la scenejo ; en la duonlumo, la riĉaj kostumoj glimbrilis, la ŝmin-koblankaj vizaĝoj de la aktoroj similis helajn fantomojn kaj malnova muziko lulis la spektantojn. Ŝajnis pentraĵo de Caravage aŭ Poussin, kiu ekvivis.

Mi eliris tute ĉarmita. Tio estis mia unua renkonto kun la baroka teatro.

Per siaj konvencioj, la baroka enscenigo proponas novan legadon de gravaj tekstoj de la XVIII-a jarcento. For de nura « rekonstruado », la retrovita saporo de la lingvo kaj voĉoj, la gesta koreografio, la kandela lumo, la kostumoj, la odoroj de ciro kaj pudro kunagas por transloki kaj kortuŝi la spektantojn, kiel en fora vojaĝo, kaj aperigas al ili la aŭtentikecon de la tekstoj. Ankoraŭ partoprenas en la ĉarmo klaviceno, teorbo, gambovjolo, liuto, hobojo, kiuj akompanas ĉiun

spektaklon.

La nuntempaj barokaj artistoj bazas iliajn laboron kaj inspiron sur dokumentoj de la XVII-a jarcento (traktatoj, leteroj, gazetoj, bildoj, partituroj). La baroka ludmaniero apogiĝas sur tri nedisigeblaj aksoj : lingvaĵo (fonetiko, melodieco kaj ritmo), gestaro kaj energio (korpa kaj voĉa).



En baroka teatro, ĉiuj gestoj, eĉ la pli malgrandaj, signifas ion, tiel same ol vortoj : pozicio de la fingroj, manoj kaj korpo simbolas pre-

precizan personon aŭ senton. Tiu kodita gestaro varias laŭ intenseco, ritmo kaj signifo de la teksto por naski veran korpan alfabeton, mutan kaj universalan lingvon. La « koreografio » de la tuto de pozicioj, gestoj kaj teniĝoj kreas iun « enscenigon », kiu, per sia pureco kaj sia konstruo, elvokas la skulpturan kaj pentran arton de la italajn kaj francajn majstrojn je la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj... Tiu aparta koreografio postulas rigoran laboron de aktoroj por rezulto potencege poetika.

La lingvo, kiun oni iam aŭdis je la kortego, la teatrejoj aŭ la juĝejoj, estis tia stranga por samtempulo de Molière, kiel por nuntempa spektanto. Prononci la « r » vibrantaj, la mutajn « e » kaj la finajn konsonojn postulas precizan trejnadon, sed tiu parolmaniero, for de esti « klera », ŝajnas tre proksima de ni kaj rememorigas iujn akĉentojn, kiuj pluestas en niaj regionoj aŭ en franclingvaj landoj kiel Kebekio ; estas forgesita muziko, kiu kantas al la orelo, kiel eĥo de niaj radikoj.

Alia stranga afero por la nuntempa spektanto estas, ke la aktoroj ludas fronte al publiko : ili ne interrigardas kaj ne (aŭ apenaŭ)



tuŝas unu la alian. Tiel, ilia voĉo kaj ilia energio iras rekte al spektantoj, kiu iĝas veraj partoprenantoj en la ludo. Iam, tio necesis por altiri la atenton de la publiko ĉar oni ludis teatraĵojn en brua etoso ; alia afero estas, ke la reĝo povis esti spektanto kaj oni ne rajtis turni la dorson al li. Nuntempe, tio aldonas kroman dimension al la rilato inter aktoroj kaj spektantoj.

En nia regiono, iu teatra trupo proponas tiajn teatraĵojn : « La fabrique à théâtre ». Ĉijare, ili prezentas novan spektaklon : « Les Fâcheux » de Molière. Bedaŭrinde, kiam vi legos tiun artikolon, la du prezentoj estos jam estinteco. Sed vi povas trovi ilin ĉe la reto :

<http://www.lafabriqueatheatre.com/>

http://www.youtube.com/watch?v=TmgUp_U63Tw

Hélène Alessandri

Dum la Festivalo...



Centre Culturel Espéranto-Touraine
Maison des Sociétés, Halles de Tours
Place gaston Paillhou, 37000 TOURS
Tel : 02 47 55 20 10
Esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<http://esperanto-tours.1s.fr>